Espéranto Angers

# La Letero

2019 - 05

Amika evento okazis en Anĝevo dimanĉon la 28-an de aprilo, organizita de Esperanto-Angers. Post la bonveno al la partoprenantoj per trinkaĵoj kaj biskvitoj, prelegantoj kaj animantoj interagis : Michel DECHY, Christian RIVIÈRE, Serge SIRE kaj Jacques LE PUIL.

- Michel DECHY, kiu tradukis Esperanten plurajn albumojn de Hergé kaj pasie klopodis por ties eldono, montris al ni la diversajn aspektojn humurajn de la verko de Hergé surbaze de la famkonata albumo *Tinĉjo en Tibeto*.

- Christian RIVIÈRE prezentis al ni la bildstrion *Hägar Dünor* kiun li tradukis al Esperanto, kaj eldonis en pluraj libretoj.

HE! HUMURO ESPERANTO



*Michel Dechy klarigas la humuron de Hergé helpe de la albumo Tinĉjo en Tibeto (Tintin au Tibet)*



*Christian Rivière prezentas la bildstriojn Hägar Dûnor en Esperanto*





# HE! HUMURO ESPERANTO



Jacques Le Puil akompanita de Serge Sire

Poste, la tempo alvenis por aperitivo, tre bongusta loka miksaĵo nomata "anĝeva supo". Tiu pretigis nin al komuna manĝo, animata per kelkaj humuraj rakontetoj de Serge SIRE.
En la posttagmanĝo okazis la interveno de Jacques LE PUIL kun lia gitaro, kiu interpretis sian famkonatan repertuaron de kanzonoj, akompanata de Serge SIRE je saksofono aŭ klarneto.
Ĉiuj kiuj helpis kaj partoprenis je la sukceso de tiu tago estas varme dankataj.




*Humuraj desegnoj estis alkroĉitaj en la salono*





*Dum la komuna tagmanĝo*

*Serge Sire rakontas humuraĵojn per multaj gestoj*

## « Gaby » Tréanton forlasis nin !



Pli kutime nomita « Gaby », Gabrielle Tréanton, el Bretonio, forpasis la 6-an de aprilo, 99-jaraĝa. En 1946, Gaby eklernis Esperanton, ŝi estis tiam instruistino. Ŝi daŭre praktikis la universalan lingvon, kaj instruis ĝin al multnombraj plenkreskuloj kaj infanoj. Ĉiam disponebla kaj rimarkinde afabla, ŝi akceptis multajn esperantistojn ĉe sia hejmo, venantaj el la tuta mondo. La impona kontribuado de Gaby al la Esperanta movado longtempe restos en niaj memoroj. Ŝi lasas al ni belan ekzemplon de sindonemo por la Esperanto.

**Espéranto-Angers**
3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr